

## Uvodnik

## Frontartikolo

Tokrat posvečamo uvodnik spremembi sloga našega biltena. Po 20 letih izhajanja, v katerih se je oblika in vsebina spreminjala v odvisnosti od tehničnih in kadrovskih možnosti, je tokrat vzrok za menjavo sloga tehnična težava pri tiskanju papirne inačice biltena. Verjetno ste opazili v zadnjih številkah v tiskanih izvodih nepravilnosti pri ležečih napisih. Upamo, da bomo računalniško neuskklajenost s spremembo vrste črk (fonta) odpravili, hkrati pa z nekaj drugimi tehničnimi prijemi povečali berljivost besedil. Sicer pa se držimo vodila, da ima vsebina prednost pred obliko.

Ker smo v času letnih zborov in skupščin esperantskih organizacij, ko se polagajo računi o preteklem delu in sprejemajo načrti za prihodnje aktivnosti, lahko izrazimo posplošeno oceno, da je dejavnost zadovoljiva, da se je v primerjavi s prejšnjim obdobjem celo izboljšala, sloni pa žal na majhnem številu zelo prizadevnih starejših esperantistov. Iz tega sledi zaključek, da je nujno potrebno v vseh okoljih zastaviti vse sile za pridobitev novih članov in podpornikov. **IO ZES**

## Iz dejavnosti ZES

## El la agado de SIEL

## Vabilo na skupščino ZES

Vabimo na redno letno Skupščino Zdrženja za esperanto Slovenije, ki bo  
**v soboto, 19. marca 2016, ob 10.30 v Ljubljani**  
v sejni sobi na Štefanovi 11.

Dnevni red:

1. Ugotovitev sklepčnosti in izvolitev organov skupščine
2. Poročilo o delu, finančno poročilo in poročilo Nadzornega odbora, razprava in razrešnica
3. Volitev organov ZES za obdobje 2016-2017
4. Program dela in finančni načrt za leto 2016
5. Razno

Pisna gradiva boste prejeli na začetku skupščine. Po uradnem delu bo v istem prostoru družabno srečanje.

## Zamenhof-Tago en Ljubljana

Celebrado de tiel nomata Zamenhof-Tago, kiu kuniĝas la datrevenon de la naskiĝo de Zamenhof, kreinto de la internacia lingvo Esperanto, la Tagon de homaj rajtoj kaj la Tagon de Esperanta Libro, estas ĉe ni longjara tradicio. Tiam, en la tempo de jarfino, kunvenas tiel la plej aktivaj esperantistoj kaj amikoj de la Esperanta movado kiel ankaŭ tiuj, kiuj nur malofte aliĝas al niaj renkontiĝoj. Ĉar ĉiokaze emfazo fokusiĝas je malstreĉa kuniĝado, ĝi estas krom la jarkunveno la plej ŝatata aranĝo de niaj societoj kaj de la Slovenia Esperanto-Ligo. Ankaŭ ĉijare ni aranĝis du solenaĵojn en malsamaj tagoj en Ljubljana kaj Maribor, por tiamaniere mallongigi la vojon al partoprenantoj kaj ebligi ilin laŭ deziro viziti ambaŭ solenaĵojn.



Oni montris la slovenan afiŝon okaze de la Tago de la esperanta libro

En Ljubljana ni ĉifoje renkontiĝis kaj festis la tri tagojn sabaton, la 5-an de decembro je la 10a horo en Štefanstrateto 11. Kolektiĝis 16 personoj el la tuta Slovenujo. En solene ornamita halo ni plenumis la sekvan programon:

- Saluto kaj alparolo (Nika Rožej, Janez Jug)
- Kantado de la esperanta himno kaj de la Eŭropa himno en Esperanto
- Recito de la nova traduko de balado de Anton Aŝker (Tomaž Longyka)
- Vortfarado en Esperanto (Janez Jug)
- Du popolkantoj slovene kaj Esperante (Metka Ŝtok)
- Motivado por esperantaj aktivecoj (Ostoj Kristan)
- Instruado de Esperanto en la Elementa lernejo Anton Ukmar en Koper (Peter Grbec)
- Ankoraŭ unu popolkanto slovene kaj Esperante (Metka Ŝtok)
- Translokiĝo en la salonon.

Por himnoj kaj popolkantoj estis al dispono notoj kaj tekstoj, en la slovena aŭ/kaj en Esperanto. Ĉiu partoprenanto ricevis ankaŭ skribmaterialojn por kompletigi la prezentaĵon de la motivado por Esperantaj aktivecoj. La prelegojn pri vortfarado en Esperanto kaj pri instruado de Esperanto en Koper, kiuj estis prezentitaj esperante, la prelegantoj akompanis per projekciado de bildoj kaj teksteltiroj sur la muro.

Tomaž Longyka, kiel la unua prezentado, recitis sian plej novan tradukon de baladoj de Anton Aŝkerĉ, kio restas lia amata temo. Ĉiĉfoje li ĉarmis nin per eleganta Esperanta reverko de *La dumnokta pasaĝerino*, balado, kiu jam per nura temo altiras atenton de junuloj kaj maljunuloj, sed la tradukisto aldone plezurigis nin per sia interpreto de la poemo, kiun li recitis sentoplene, verve, eĉ pasie.

Ĉar li ne sukcesis traduki por ĉi tiu aranĝo du baladojn de Aŝkerĉ, kiel li estis planinta, Tomaž aldonis ĝis nun nepublikigitan poemon, kiun li verkis antaŭ ok jaroj en sia ĉambro de la hotelo Jowita en Poznano kaj dediĉis ĝin al sia studkolegino Jurate el Litovio okaze de ŝia diplomekzameno.



Metka Ŝtok bele kantis sen muzika akompano

Speciala gastino de la aranĝo estis pop- kaj ĵazo-kantistino Metka Ŝtok. Renoma ankaŭ kiel ŝanson-kantistino, ŝi eĉ sen muzikinstrumenta akompano per sia profunda kaj lerta voĉo komence direktis nian senprentendan kantadon de himnoj, kaj poste ŝi virtuoze kantis kelkajn popolkantojn slovene kaj interpretis ilin ankaŭ en Esperanto. Ni kun verve kunkantis la esperantajn tekstojn de *Fratoj tre gajaj ni* (Bratci veseli vsi), *Ho, kiel*

*mi amus* (Kako bom ljubila) kaj *Monteton aĉetos mi* (En hribĉek bom kupil). Kaj nia kantado estis surprize harmonia.

Ankaŭ ĉiuj tri fakaj prelegoj altiris atenton kaj diskuton de geĉeestantoj. La tekstoj en redaktita formo estos al dispono ankaŭ al alia publiko per aperigo en la bulteno *Informacije / Informoj* kaj en ttt-paĝaro de SIEL.

La prelego pri esperanta vortfaradomontris, ke ĉe akceptado de novaj terminoj kaj ilia uzado oni devas konsideri bazajn principojn de Esperanto kaj ke oni devas senĉese sekvi lingvajn gvidliniojn kaj instrukciojn de Akademio de Esperanto. Tro granda libereco kaj nekonsekvenceco en la vortfarado povas malutili al la evoluo de Esperanto.



Janez Jug sekvis la originajn instrukciojn de L. L. Zamenhof

La klara raporto pri motivado por esperantaj aktivecoj atentigis nin pri malfortoj kaj elvokoj en la esperantista movado. La prelego ofertis kelkajn klasikajn kaj pli modernajn ilojn por pli sukcesa efektivigo de laborprogramoj, interalie detale ellaboritan skemon kun taskoj, terminoj kaj devontigoj, kaj personan afiŝon »Ĉiutage 5 minutojn por Esperanto«.

La prelego pri la instruado de Esperanto en Elementa lernejo Anton Ukmar en Koper prezentis utiligeblojn kaj eblojn de la reta aplikaĵo Duolingo kaj esperigajn efikojn por la motivado kaj lernprogreso rilate al lingvoscio de gelernantoj. Tiu sama lernado malgraŭ la simpla kaj amuza metodo postulas pensadon en tri lingvoj kaj sendependan serĉadon de la plej bonaj solvoj.

Unu horo kaj duono da celebrado pasis nesentoble rapide kaj la translokiĝo en la salonon ne haltigis viglan debaton. Tie oni preparis modestan gastigon por diversaj gustoj: hejme faritan vinon, senalkoholajn trinkaĵojn, fruktojn, delikataĵojn, hejme faritajn kukojn kaj frandaĵojn. Oni multe babilis, ĉar ĉiĉfoje estas inter ni kelkaj novaj vizaĝoj, ankaŭ ĉiĉfoje, kaj ekkono de novaj amikoj estas precipe multvalora.



Decembro estas ĝusta tempo por aĉeti donacetojn kaj specialajn poŝtmarkojn

Kiel kutime vendiĝis esperanta literaturo kaj personaj poŝtmarkoj (eldono rilate la 90-an jubileon de Esperanto-Societo Ljubljana, nur kelkaj ekzempleroj estas ankoraŭ aĉeteblaj!). Oni ankaŭ povis pagi la membrokotizon.

Je la fino ni deziris unu al alia belajn festotagojn kaj feliĉan novan jaron 2016. **O.K.**

### Nov poslovni račun ZES

Koniec decembra 2015 je ZES preneslo svoj poslovni račun iz NLB v Delavsko hranilnico d.d. Ljubljana. Tako je sklenil Izvršni odbor ZES, da bi zmanjšal stroške računa in bančnih provizij. Hkrati je ZES izkoristil ugodno ponudbo za spletno poslovanje z računom. Prej te storitve nismo imeli.

Naslov novega računa je naveden na zadnji strani v kolofonu in v obvestilu za plaĉevanje ĉlanarine. Prosimo, bodite pozorni na spremembo številke računa pri ZES, medtem ko je pri Esperantskem druŝtvo Ljubljana, ki ima prav tako poslovni račun pri Delavski hranilnici, spremenjena viŝina ĉlanarine, poslovni račun pa je isti kot doslej. **O.K.**

Iz dejavnosti EDL

El la agado de ESL

### Peta seja IO EDL

Peta redna seja Izvrŝnega odbora druŝtva je bila 2. februaria 2016 ob 18. uri na Ŝtefanovi 9. Prisotni so bili vsi ĉlani IO in predsednik NO druŝtva. Pregledano je bilo opravljeno delo od preŝnje seje. Doloĉen je bil datum in okvirni program za 6. jezikovni veĉer (kratko poroĉilo o izvedbi je v nadaljevanju). Prav tako je bil doloĉen ĉas in dnevni red za letni zbor druŝtva. Obravnavani so bili osnutki ŝe pripravlenih gradiv in sprejete smernice za ostala gradiva in kadrovskie predloge, saj je

letoŝnji obĉni zbor volilne narave. Zapisnik zbora s prilogami je objavlen ŝe v tej ŝtevilki biltena.

Precej ĉasa je bilo posveĉenega tudi realizaciji posameznih nalog iz programa dela druŝtva, na primer naĉrtovanim predstavivam esperanta na ŝolah ter zlasti vzpostavivti kontakta z oddelkom za kulturo pri MOL. **O.K.**

### La 6-a lingva vespero

Mardon, la 16an de februaro 2016 je la 18a horo, okazis en la klubejo en Stefanova 9, Ljubljana la sesa paroliga vespero en Esperanto. Ĉeestis 9 geanoj de Esperanto-Societo Ljubljana: Nika Roŝej, Ana Ferrer Zadavec, Janez Zadavec, Cvetka Bezak, Tomaŝ Longyka, Metka Duhovnik, Janez Jug, Milan Ŝkrliĉ in Ostoj Kristan.



Nika Roŝej pri la lago de Cerknica

La gvidan prelegon pri la graveco kaj protektado de malsekejoj en la mondo kaj en nia lando preparis kaj prezentis Nika Roŝej. Poste ŝi fordonis sin al la intermita lago de Cerknica kaj pli detale klarigis ekeston, interesaĵojn kaj ecojn de la lago. Ŝi montris ankaŭ vicon de bildoj kaj mapoj. La prelegantino prezentis interalie esperanto-slovenan vortareton el terminoj, ligitaj al la temo de la prelego. La tuta enhavo de tiu interesa prelego unue aperas kiel aparta artikolo en la *Beletra angulo* de tiu ĉi numero de la bulteno.

Post la prelego la ĉeestantoj pridiskutis interesajn kaj malpli klarajn vortojn por plibonigi kaj riĉigi la rilatan vortareton. Post unu horo da vigla nuresperanta debato oni dankis al Nika por la klopedo, investita en la preparado de la paroliga vespero. Tomaŝ akceptis la malfacilan taskon kontrollegi la tekston de la artikolo por la aperigo. Kontentaj kun ankoraŭ unu



sukcesa kaj agrabla faka kunveno de ESL-anoj, ni ĝojas pro la venontaj. **O.K.**

## Zapisnik

rednega letnega občnega zbora Esperantskega društva Ljubljana, ki je bil **v ponedeljek, 22. februara 2016, ob 18.30 uri v Ljubljani** v sejni sobi MOL – Oddelka za lokalno samoupravo, Štefanova 11.

**Prisotni:** Meta Duhovnik, Ana Ferrer Zadavec, Janez Jug, Ostož Kristan, Jernej Lindič, Angela Logar, Tomaž Longyka, Nika Rožej, Milan Škrlić in Janez Zadavec.

Vsi člani društva so predhodno pravočasno prejeli pisno vabilo in gradivo za zbor po klasični ali elektronski pošti. Zbor je bil oglaševan tudi na spletišču [www.esperanto.si](http://www.esperanto.si) in na facebook-strani *Esperanto Slovenija*.

Ker ob predvidenem začetku občni zbor ni bil sklepčen, saj ni bila navzoča več kot polovica članov s pravico glasovanja, se je začetek odložil za 30 minut, nakar je občni zbor veljavno sklepal, ker je bilo navzočih 10 članov (25. člen pravil EDL).

**K 1. točki** Redni občni zbor je pozdravila predsednica društva Nika Rožej. V delovne organe so bili soglasno izvoljeni: delovni predsednik – Janez Zadavec, zapisnikarica – Meta Duhovnik, overovatelja zapisnika – Milan Škrlić in Ana Ferrer Zadavec.

Predlagan in sprejet je bil naslednji **dnevni red**:

1. Ugotovitev sklepčnosti, izvolitev organov občnega zbora (delovnega predsednika, zapisnikarja in dveh overovateljev zapisnika) in potrditev dnevnega reda
2. Poročilo o delu, finančno poročilo in poročilo Nadzornega odbora
3. Razprava in sprejemanje poročil ter sklepanje o razrešnici organom društva za preteklo obdobje
4. Predlaganje in volitve organov društva za obdobje 2016-2017
5. Predstavitve programa dela in finančnega načrta za leto 2016, razprava in sprejemanje
6. Delegiranje zastopnikov društva za skupščino ZES
7. Razno

**K 2. točki** Predlog poslovnega poročila o delu društva in o finančnem poslovanju v letu 2015 je bil predhodno poslan z vabilom. Poročilo sta dodatno obrazložila Nika Rožej in Ostož Kristan. Poročilo Nadzornega odbora s sestanka dne 16. 2. 2016 je podal Janez Jug in posebej pohvalil vestno vodenje financ. Obe poročili sta priložila k temu zapisniku.

**K 3. točki** Občni zbor je po razpravi o poročilih sprejel naslednji sklep:

Sklep 1: Občni zbor soglasno sprejema Poročilo o delu v letu 2015, Poročilo o finančnem poslovanju za leto 2015 in Poročilo Nadzornega odbora ter daje razrešnico organom društva za preteklo dvoletno obdobje.

**K 4. točki** Izvršni odbor društva je pripravil predlog za sestavo novih organov društva. Po predstavitvi predloga je bil soglasno sprejet sklep:

Sklep 2: V organe ED Ljubljana so izvoljeni za čas od letnega zbora 2016 do letnega zbora 2018 naslednji člani in članice:

**Izvršni odbor:** Nika Rožej kot predsednica in člani Meta Duhovnik, Ana Ferrer Zadavec, Ostož Kristan in Milan Škrlić.

**Nadzorni odbor:** Janez Jug kot predsednik in člana Janez Zadavec in Tomaž Longyka.

**Častno razsodišče:** Svobodan Zlatnar kot predsednik in člana Jernej Lindič in Angela Logar.

**K 5. točki** Predloga programa dela in finančnega načrta za 2016 sta bila v pisni obliki posredovana z vabilom na letni zbor. Ob predpostavki, da izvršni odbor glede na trenutne razmere lahko program dela prilagodi, je bil sprejet sklep:

Sklep 3: Predlagan program dela se v točki 3 dopolni z dodatnim nosilcem (Tomažem Longyko), v točki 8 predlaganega nosilca (IO EDL) zamenja Nika Rožej, predlagana točka 9 pa se iz programa izloči. Spremenjen program dela ED Ljubljana in finančni načrt za leto 2016 se sprejmeta. Čistopis programa dela in finančni načrt sta priložila k zapisniku letnega zbora.

Sklep 4: V skladu z finančnim načrtom sprejme občni zbor spremenjeno višino letne članarine za leto 2016 in naprej: 12 € za zaposlene člane, 6 € za brezposelne, upokojene in študente ter 0 € za mlajše od 18 let.

**K 6. točki** Predlagano je bilo, da zbor glede na število članov društva delegira 5 zastopnikov društva za skupščino Združenja za esperanto Slovenije in poravna ustrezno članarino kolektivnega člana v ZES. Zastopniki morajo biti dejavni v organih ZES ter imajo aktivno in pasivno volilno pravico v skupščini ZES.

Sklep 5: Kot zastopnike ED Ljubljana za skupščino ZES se imenujejo: Meta Duhovnik, Janez Jug, Tomaž Longyka, Nika Rožej in Janez Zadavec.

**K 7. točki** Ni bilo razprave.

Letni zbor je bil zaključen ob 20.00 uri.

Priloge:

- Poslovno poročilo za 2015
- Poročilo Nadzornega odbora za 2015
- Program dela in finančni načrt za 2016
- Seznam prisotnih



Pisna gradiva močno skrajšajo potek občnega zbora

## Program dela EDL za leto 2016

Aktivnosti Esperantskega društva Ljubljana (EDL) so že po naravi tesno prepletene z Združenjem za esperanto Slovenije (ZES) in nujno povezane s programom dela ZES. Pri tem naj bi EDL prednostno izvajalo dejavnosti območnega značaja in naloge, za katere ZES ni posebej pristojno. Predlagani program dela lahko IO EDL glede na trenutne razmere prilagodi in dopolni. Ob vsaki točki je napisan predvideni nosilec dejavnosti.

1. Sodelovanje z esperantskimi in drugimi društvi s podobnimi cilji delovanja v Sloveniji in tujini (EDM, ŽED, območne sekcije ZES, TEA, ED Reka, Društvo klasikov itd.) – IO EDL
2. Udeležba naših članov na esperantskih srečanjih doma in v tujini (kongres UEA v Nitri, konferenca Alpe - Jadran, tromeja Peč, tromeja v Prekmurju, »bogračfest« v Lendavi, Karstaj tagoj, mednarodno srečanje ob dnevu esperanta in obiski društvenih dogodkov) – delegati in člani
3. Urejanje in prispevanje obvestil in člankov za glasilo ZES *Informacije / Informoj* – Kristan, Longyka
4. Prispevanje obvestil in člankov za spletne strani spletišča *esperanto.si* – člani
5. Sodelovanje pri pripravi programa in izvedbi proslave ob Zamenhofovem dnevu 2016 – IO EDL
6. Raziskovanje zgodovine gibanja esperanta v Ljubljani in predstavitev najdb – Janez Zadavec
7. Objavljanje člankov o esperantu in jezikovni enakopravnosti v javnih glasilih – člani

8. Priprava turističnega prospekta Ljubljane v esperantu – Rožej
9. Izdaja spletnega slovensko – esperantskega slovarja Mice Petrič – Jug
10. Predstavitve esperanta na osnovnih šolah in drugih prireditvah ob Evropskem dnevu jezikov in ob drugih priložnostih – Rožej, Jug, Kristan
11. Razpis in organiziranje začetnega tečaja esperanta (knjižnica, šola, ljudska univerza, tretja univerza) – IO EDL
12. Dvomesecni jezikovni večeri z vnaprej pripravljenim programom – IO EDL
13. Izvajanje nujnih finančnih in administrativnih nalog ter obveščanje članstva – Kristan
14. Urejanje arhiva in evidenc društva – Rožej
15. Animiranje in pridobivanje nekdanjih in novih članov društva – IO EDL
16. Vzpostavitev stikov z oddelkom za kulturo MOL – Škrlič, Rožej
17. Nabava društvenega prapora – IO EDL.
18. Izvajanje administrativnih in računovodskih opravil – Rožej, Kristan.



Pregled kakovosti tipkopisa Modrijanovega prevoda

Iz dejavnosti KEP

El la agado de EKP

## Razpustitev kluba



V rubriki, posvečeni dejavnosti Kluba esperantistov Posavja, moramo najprej z obžalovanjem povedati, da je KEP / EKP po treh letih živahne dejavnosti 29. januarja 2016 zaradi samorazpustitve prenehal obstajati kot samostojna esperantska organizacija. Po lanskoletnem izstopu iz sekcije Beseda KD Franc Bogovič Dobova in enoletnem samostojnem delovanju v Brežicah so se člani KEP odločili, da bodo svojo privrženost esperantu in idejam esperantskega gibanja nadaljevali kot individualni člani

ZES ali drugih esperantskih organizacij ali kot nepovezani prijatelji in ljubitelji esperanta. Glede na to, da je v Posavju več kot 10 esperantistov in da so nekateri od njih še zelo polni moči in zamisli, lahko pričakujemo, da bodo ostali povezani vsaj kot območna sekcija Združenja za esperanto Slovenije za Posavje, ki pa jo mora IO ZES še formalno ustanoviti ter imenovati njenega predstavnika v organih Združenja.

Do nadaljnjega pa vse, ki jih zanima dogajanje med esperantisti v Posavju, usmerjamo na spremljanje spletnega mesta <http://www.antonmihelic.com/>. Tam so tudi povezave do člankov v esperantu in/ali slovenskem jeziku iz pretekle dejavnosti KEP ter do aktualnih vesti, časopisov, tečajev itd. **O.K.**

## Esperanto en la »Angla vespero«

La Slavista societo de Posavje aranĝis ĵaŭdon, la 7an de januaro 2016, vesperon de la angla literaturo en la belega prelegejo de la Elementa lernejo Brežice. Anton Mihelič kaj lia edzino Reneja mallonge prezentis agadon de la Esperanto-klubo Posavje, kelkajn modernajn manierojn de lernado de Esperanto (ekz. Duolingo ktp.) kaj la historion de la angla reĝo Rikardo la Tria. Poste ili laŭtleĝis fragmenton de la enkonduka monologo el la dramo "Rikardo la Tria" de William Shakespeare en Esperanto (traduko de John Islay Francis 1924-2012) kaj en la slovena lingvo. Ĉeestis 21 slavistoj, amantoj de la angla literaturo kaj gelernantoj de la Gimnazio Brežice. Oni laŭtleĝis diversajn anglajn poemojn kaj prozaĵojn kaj kantis anglajn baladojn. La kunlaboro de Anton kaj Reneja estis grava kontribuo de la Esperanto-klubo Posavje al popularigo de Esperanto en la regiono. **A.M.**

Iz dejavnosti EDM

El la agado de ESM



## Novosti na spletišču EDM

Na spletišču EDM je vedno kaj novega, kar dokazuje živahno dejavnost v društvu pa tudi prizadevnost skrbnika spletišča. Prav gotovo je najbolj aktualen in podroben koledar dejavnosti društva, ki ga najdete pod zavihkom Dogodki | Okazaĵoj. Če na koledarju, ki tabelarično prikazuje po pet tednov, poiščete ustrezni mesec in dan, najdete načrtovane dogodke z opisom

kraja, časa, vsebine, izvajalca, prijave in podobno. Trenutno so v teku dva tečaja, ki ju vodita Mario in Zlatko, ter konverzacijski večeri (Zdenka).

Tudi sicer je vedno koristno pobrskati po rubriki Dogodki in Novice tega spletišča. Spodnji prispevki so povzetek poročil in galerij slik, ki jih najdete v omenjenih dveh rubrikah. **O.K.**

## Zamenhofov dan v Mariboru



V Mariboru smo se v soboto, 12. decembra 2015 v lepem številu zbrali na Meljski 37 tako mariborski esperantisti, kakor tudi nekaj gostov iz

Ljubljane in Brežic. Vsega je bilo prisotnih 24 oseb.

V počastitev obletnice rojstva L. L. Zamenhova in zaznamovanje Dneva esperantske knjige smo na programu imeli sledeče:

- Vinko Ošlak je predstavil svoj prevod angleške knjige *The Pilgrim's Progress* avtorja Johna Bunyana v esperanto in slovenščino.
- Zlatko Tišlar je predstavil svoje delo *Nekutime pri multio*, napisano v esperantu.
- Družabni del pri obloženi mizi.

15. december je rojstni dan L. L. Zamenhova (1859-1917), avtorja esperanta. Na pobudo enega izmed pomembnih esperantskih pisateljev, Julia Baghyja, praznujemo ta dan tudi kot dan esperantske kulture.



Vinko Ošlak med predstavitvijo prevodov Bunyana

Za dvig duhovne ravni esperantistov Baghy predlaga, da bi moral biti Zamenhofov dan tudi dan esperantske knjige. Ob kulturnih dogodkih lokalnih skupin naj bi obveščali neesperantiste o mednarodnem jeziku esperantu, o njegovi bogati literaturi in izvornikih in prevodih. Pokažimo, kako naše gibanje širi kulturna



dela raznih narodnosti, kar omogoča ljudem drugih jezikov uživanje del drugih narodov.

To naj bi bil naš prispevek k Zamenhofovemu dnevu za pravično, enakopravno komuniciranje, ki spoštuje jezikovno, kulturno raznolikost, v prizadevanju za trajno ohranjanje teh bogastev in pravic.

Poleg pripravljanih srečanj, prireditev, predavanj o Zamenhofu, bi naj ta dan imeli praznik esperantske literature tudi z nakupom, branjem nove knjige! **M.V.**

## Konverzacijska srečanja

Od januarja 2016 prireja EDM konverzacijska srečanja v prostorih četrtne skupnosti Center na Kacovi 1 v Mariboru. Na srečanjih se bomo pogovarjali o v naprej določenih temah, tako da se bo mogoče pripraviti. Teme o katerih se bomo pogovarjali, bomo sproti določali in tudi objavljali. Če se želite udeležiti kakšnega konverzacijskega srečanja, preverite urnik na naši spletni strani pod zavihkom Dogodki | Okazašoj v rubriki Dejavnost društva – koledar.

Že prvo srečanje 14. januarja je bilo posebno – imeli smo gosta iz Moskve, Vladimirja Laričeva. Prisotni smo se najprej bolj ali manj spretno predstavili z nekaj stavki. Za tem smo zasuli z vprašanji svojega gosta.



Zdenka Rojc je pripravila scenarij srečanja

Gost drugega srečanja 28. januarja je bil dolgoletni esperantist Izidor Golob. Prisotnim se je predstavil z zanimivim opisom, kakšni so bili njegovi začetki, povezani z esperantom. Za mesec marec nam je obljubil predavanje o dejavnosti s katero se ukvarja – je edini slovenski žlahtnitelj perunik. **M.V.**

## Letna skupščina EDM

Redna letna skupščina društva je bila 25. februarja 2016 ob 17. uri v prostorih MČ Center na Meljski 37 v Mariboru. Prisotnih je bilo 16 članov in je lahko

skupščina veljavno odločala. Predstavljena so bila poročila za preteklo leto. Po krajši razpravi so bila poročila soglasno sprejeta z enim dopolnilom pri poročilu o delu. Prav tako je bil sprejet program dela in finančni načrt za tekoče leto. Skupščina je za člana predsedstva društva (izpraznjeno mesto zaradi smrti Aleksandra Heřmana) soglasno izvolila Milana Jarnoviča. Poslovni račun društva bo po novem pri Delavski hranilnici. Sklenjeno je bilo tudi, da se društvo uradno zahvali Svetu mestne četrti Center za dragoceno pomoč – brezplačno uporabo prostorov.



Uradni del letne skupščine je bil kratek, a učinkovit

Skupščina se je po enournem uradnem programu zaključila z družabnim delom. **Povzel O.K.**

Iz dejavnosti ŽED

El la agado de FES

## Letni občni zbor društva

Predvidoma bo letni zbor članov in prijateljev društva v soboto, 18. junija ob 11. uri na istem mestu kakor lani, to je v Mariboru v prostorih Mestne četrti Radvanje (pod Pohorjem). Sredi maja pa bodo poslana točnejša obvestila in vabila z dnevnim redom. **K.K.**

## O delu društva

Kakor smo že poročali, poteka v novih prostorih knjižnice Pekre na Bezjakovi 6 (podružnica Knjižnice Maribor) »študijski krožek esperanta«. Od aprila do decembra smo zaključili predelavo vseh 24 lekcij iz našega učbenika za železničarje, kar pomeni dobro jezikovno osnovo za branje, kontaktiranje in bolj poglobljeni študij. Slednjega nadaljujemo s predelavo Rakuševga učbenika za šole in tečaje, I. del, od letošnjega januarja. Velja pohvaliti gospo Adelo, ki se

je študija lotila temeljito (in s tem tudi izpolnjuje večletno željo, kako bolj aktivno preživljati svoje 'tretje življenjsko obdobje' - z esperantom).

Ljubitelji bograča in plavanja v Termah – pozor! Naš predsednik Jovan Mirkovič vas že sedaj vabi na Lendavski Bogračfest, ki bo kakor vsako leto zadnjo soboto v avgustu 2016. **K.K.**

Leposlovni kotiček

Beletra angulo

**Anton Aškerc (esperantigis Tomaž Longyka):**

### La dumnokta pasaĝerino

Plenluno veturas,  
rivero murmuras ...  
»Tuj nun, pramisto, transigu!  
Ĉar al mi urĝas.  
Antaŭ ol mateniĝas,  
mi foran jam celon atingu!«

Plenluno veturas,  
rivero murmuras ...  
Flugas trans Dravon boat'.  
Kaj pasaĝerino,  
terurega ino,  
sidas en ĝi kiel gast'.

»La korpon ostecan  
vi enlittukigas;  
kadavre odoras elspir'.  
Du braĝoj subfronte  
ardegas senhonte ...  
Ĉu vi homas aŭ estas zefir?«

»Vi ŝviton forviŝas,  
min akre observas,  
vi ĉesu! Vi pelu la floson ...!«  
Virino rektiĝas,  
ŝi kreskas, grandiĝas –  
ŝi korpe plenigas boaton.

Plenluno veturas,  
rivero murmuras ...  
Boato jen frapas la bordon.  
»Kiu vi, malfruega  
vagulin' terurega?  
Nun faru rapide la pagon!«

»Post mi pala morto,  
mizero, dezerto,  
antaŭ mi ĝemoj kaj timoj!  
Do, kiu mi estas?  
Jen, pesto mi estas!  
Trans Dravo mi serĉos viktimojn!

Mi hejmojn vizitos  
kaj homojn strangulos ...  
Kial mi pardonu nur vin?  
Vi ne aŭdos kiantojn  
nek rigardos mortantojn –  
unue mortigos mi vin!

### Ponoĉna potnica

Po nebu ŝĉip plava,  
ŝumi, ŝumi Drava...  
»Prepelji, brodnik, me takoj!  
Oh, meni mudi se;  
in preden zdani se,  
mi daleĉ je priti nocoj.«

Po nebu ŝĉip plava,  
ŝumi, ŝumi Drava...  
Ĉez reko ĉoln ĉrni leti.  
A potnica pozna,  
velika in grozna  
z brodnikom v njem tiho sedi.

»Telo ko kost suho  
zavijaŝ v rjuho;  
mrtvaŝki iz ust diŝe ti puh!  
Pod ĉelom prikrita  
dva ogla gorita...  
Živ ĉlovek si, ali si duh?«

»Kaj znoj si otiraŝ?  
Kaj v me se oziraŝ?  
Naprej, naprej tiraj svoj ĉoln!...«  
In žena vzravna se,  
glej, veĉa se, rase –  
ves ĉoln že je skoro je poln.

Po nebu ŝĉip plava,  
ŝumi, ŝumi Drava...  
Pri bregu! Ĉoln butne na kraj...  
»Kdo tujka si grozna?  
o, potnica pozna,  
brodnino odŝtej mi sedaj! —«



»Za manoj smrt bleđa,  
 puščoba in beda,  
 strah, stok in drgèt pred menoj!  
 Kdo tvoja sem druga?  
 Ime mi je — kuga!  
 Nocoj grem na desni breg tvoj!

V vsak dom se odpravim,  
 ljudi vse podavim...  
 a tebi naj milost storim!  
 Ne boš čul vpijočih  
 in gledal ne mročih —  
 zdaj prvega tebe umorim!«

**Nika Rožej:**

## Pri malsekejoj

### Ramsara konvencio

En irana urbo RAMSAR estis en la jaro 1971 subskribita interkonsento – konvencio – pri malsekejoj. Pro tio ni festas la 2an de februaro kiel tagon de malsekejoj. La ĉefa sidejo de la Konvencio situas en Gland, Svisujo, kune kun tiu de la Internacia unio por konservo de naturo.

Tiuj eventoj okazas ĉar estas pli kaj pli evidente ke estas tiaj terenoj tre gravaj por la tuta mondo kaj homaro. Ramsara konvencio parolas pri pli ol 40 specoj de malsekejoj kiujn ni devas trakti kaj konservi. Temas pri daŭrigebla utiligo kaj bremsado de atakoj kontraŭ malsekaj regionoj nuntempe kaj en la estonteco. La tasko estas disvastigi scion pri fundamentaj ekologiaj funkcioj de malsekaj regionoj kaj pri iliaj ekonomiaj, kulturaj, sciencaj kaj distraj valoroj.

### Malsekejo

Malsekejo enhavas surteran kaj subteran - subgrundan - akvon; fluantan au stagnan; salan au dolĉan, au miksitan; ĝi estas ĉiam au nur de tempo al tempo kovrita per akvo.

Malsekejoj estas marĉoj, torfmarĉoj, marĉaj ebenaĵoj, torfejoj, malsekaj herbejoj, apudmaraj tajdoebenaĵoj, flakoj, lagoj, riveroj, elflueoj de riveroj, ankaŭ mangrovoj, koralrifoj ...

La Konvencio validas ankaŭ por malsekejoj kiujn faris homo, kiel fiŝejoj, rizokampoj, salejoj, grotoj, en kiuj oni elfosis ŝlimon.

La Konvencio estas tre grava ĉar en tiuj ekosistemoj vivas tre diversaj plantoj kaj bestoj, speciale akvaj birdoj, kaj multaj el ili estas en danĝero de malapero. Tio endanĝerigus ankaŭ la diversecon de la vivaĵoj. Pro ĉio tio protekto de malsekejoj estas nepre.

### Malsekejoj en Slovenujo

Nia ŝtato pli kaj pli zorgas pri niaj malsekejoj. La fonto de Sava Dolinka Zelenci kun marĉo estas de 1992 natura rezervejo.

La salejoj en Sečovlje fariĝis en 1993 la unua Slovena Ramsara loko. La unuaj skribaj fontoj de tiuj salejoj estas el la dua duono de la 13-a jarcento. En ili estis observitaj 260 diversaj specoj de birdoj.

Kavernoj de Škocjan (Škocjanske jame) estas de 1986 enskribitaj en la Listo de monda natura heredaĵo ĉe UNESCO. Ili estas eksterordinara ekzemplo de kontakta karsto kun unu el la plej grandaj konataj subteraj kanjonoj en la mondo. En la jaro 1999 ili venis kiel la unua subtera malsekejo en la mondo sur la liston de Ramsara konvencio. Ĝi troviĝas ankaŭ sur la listo de gravaj protektitaj partoj de biologia diverseco en Mediteraneo (Barcelona konvencio).

Oni preparas proponon ke ankaŭ torfeja marĉo de Ljubljana venos sur la liston de Ramsar.

En Slovenujo la plimulto de gravaj malsekejoj estas sub administro de regionoj de Naturo 2000.

Malsekejoj estas tre gravaj por helpi kontraŭ inundoj. Ili funkcias kiel spongoj kiuj retenas multe da akvo. Ili riĉigas subteran akvon, zorgas pri trinkebla akvo kaj purigas akvon.

Malsekejoj estas belaj turismaj lokoj por ĝui naturon ktp.

### Cerknica kun ĉirkaŭaĵo

La plej konata estas la Cerknica lago kiu aperas plejofte en printempo kaj en aŭtuno ĝi malaperas. Preskaŭ neniu povas diri kiam ĝi estos lago kaj kiam nur herbejo sur la fundo de poljo. Ĝi estis mirakla jam de antika tempo (greko Strabo kaj romiano Vergilo), speciale interesa en la 17a jarcento, kiam Janez Vajkard Valvasor observis kaj provis diveni kiel kaj kial la lago kaŝas sin.

La 6an de septembro 2002 estis diskonigita regiona natura parko de la municipo Cerknica por reteni naturajn kaj kulturajn valorojn. Ĝi estas 222 km<sup>2</sup> granda teritorio. Pli ol grandeco estas grava la riĉo de vivaj kreskaĵoj kaj organismoj.

En la jaro 2006 Cerknica lago kun ĉirkaŭaĵo fariĝis la tria slovena malsekejo enskribita en la liston de Ramsaraj regionoj.

Biologiaj, ekologiaj, hidrologiaj kaj morfologiaj ecoj de Cerknica lago kun ĉirkaŭaĵo kun riĉaj vivaĵoj montras efikecon kaj interdependecon de surteraj kaj subteraj vivosistemoj-ekosistemoj-, naturaj kvalitoj de internacia signifo de karstaj malsekejoj.

Diverseco de vivokondiĉoj en la regiono donas eblon por evolviĝo de multaj akvaj, marĉaj kaj teraj plantoj.

Specialaĵo de Cerknica lago estas plantoj duvivaj, duone vivantaj sur la seka tereno, duone en la akvo. Ĉitie vivas 3/4 da ĉiuj papiliaj specoj, vivantaj en Slovenujo, 3/4 da ĉiuj specoj de amfibioj en Slovenujo kaj 3/4 de ĉiuj specoj de birdoj en Slovenujo.

Cerknica lago apartenas al la sistemo de karstaj malsekejoj. En la riverbaseno de Ljubljana troviĝas la plimulto de la savitaj malsekejoj en Slovenujo. La karsta regiono kun malaltaj marĉoj sur Bloka altebenaĵo estas kompleksa sistemo de surteraj kaj subteraj malsekejoj kun Cerknica poljo kaj Planina poljo, Rakov Ŝkocjan kaj valoj de Pivka kaj Nanoŝčica. Specialaĵo estas endema subtera faŭno.

### Cerknica kampo – poljo – lago

En la tera epoko kenozoiko, kiam la tera ŝelo faldiĝis, fariĝis »faŭlto de Idrija« en direkto de Planina sude de Rakek al Cerknica poljo, do en Dinara direkto (de nordokcidento al sudoriento).

Cerknica poljo havas la saman direkton. Sur la norda parto la grundo konsistas el terciara dolomito, kiu ne estas akvotralasa. Ĝi estas rompebla, disfalema. Je tiu flanko enfluas surtere rivero Cerkniŝčica kiu zorgas por trinkebla akvo en la regiono.

Je la orienta flanko troviĝas pitoreskaj montetoj el diversspeca grundo. En sudorienta parto etendiĝas krute dekliva alta bordo kaj sube la fundo post pluvo vomas multegon da akvo.

Du trionoj de la laga fundo tenas akvon kaj unu triono ne. Pri la nivelo de la akvo zorgas pluvo kaj riveroj, torentoj kaj fontoj, pli videblaj en la norda parto de la lago. Akvo forfluas, malaperas en la teron, en tuneloj, gluttruoj kaj ponoroj pli en la akvotralasanta parto.

En parto de Cerknica ĉirkaŭaĵo, Javorniki kaj Snežnik, la grundo similas al tiu sur la nuda karsto de Dinara montaro kiu etendiĝas laŭ Adriatika maro de Triesto ĝis la albana limo. Tiel devenas de Bloke kaj de Loka poljo multaj karstaj fontoj. Ili kunfluas en riveron Obrh, kiu post kelkaj alfluaĵoj riveretoj nomiĝas Stržen aŭ Jezerska reka (Laga rivero), ĉefa akva arterio de Cerknica lago. Se multe pluvas je la alia flanko de monto Snežnik, eblas ke rapide venas multe da akvo al Obrh. Eble tie sub la tero troviĝas speciala sistemo de kavoj, tuneloj, fosaĵoj. Proksime troviĝas tre bela karsta kaverno Križna jama kiu estas ankaŭ parto de subtera sistemo kaj akvo el ĝi venas al supro kiel Ŝtebenjŝčica kaj plufluas kiel Lipsenjŝčica...Tie naturo ankoraŭ hodiaŭ starigas al ni multajn enigmojn.

El hidrologia vidpunkto estas io speciala la laga golfo Zadnji kraj (Lasta loko) kie akvo plej longe restas, antaŭ ol ĝi forfluas el la lago. Tiu golfo pleniĝas el la akvoj de la montaro Javorniki. En la samaj lokoj akvo venas el la

tero kaj en la seka periodo malaperas. Tiajn fontojn oni nomas estaveloj. Akvo malaperas ankaŭ tra Gebno, Mala kaj Velika Bobnarica (Malgranda kaj Granda tamburistino), Skednenica kaj Kotel (Kaldrono).

Kiam enfluas en la lagon pli da akvo ol elfluas el ĝi, tiam ĝi pleniĝas, kaj kiam la lago estas plena da akvo, ĝi estas proksimume 10,5 km longa, 4,5 km larĝa kaj 29 km<sup>2</sup> granda.

Akvo el la lago malaperas nur subtere tra diversaj gluttruoj. La plej grandaj estas en la nordokcidenta parto, kie troviĝas Jamski zaliv (Kaverna golfo). Ili havas belajn nomojn: Okence (Fenestreto), Rakovski Mostek (Kankra Ponteto), Kosovka (Merlino), Mala Skednenca, Velika Karlovica, Skednenca, Mala Karlovica, Svinjska jama kaj Narti...Ĉe Velika Karlovica ŝajnas kvazaŭ akvo malaperus rekte en la monton.

Parto de tiu akvo fluas tra subteraj tuneloj, kavoj kaj sifonoj en la valon Rakov Ŝkocjan kiel rivereto Rak kaj venas subtere al Planina poljo, daŭrigas la fluon en direkto Logatec kaj Vrhnika kiel rivero Unica, kiu ankaŭ malaperas. La alia parto tuj turniĝas kaj venas post subtera fluo al Bistra. Ambaŭ partoj kuniĝas kaj plufluas kiel rivero Ljubljana tra Ljubljana. Ĝi estas do rivero kun sep nomoj: Trbuhovica, Obrh, Stržen, Rak, Pivka, Unica kaj Ljubljana.

Ni invitas vin ke vi mem venu kaj admiru interesan grandan riĉon de naturo de la malsekejoj en Slovenujo.

Obvestila in vabila

Informoj kaj invitoj

### Sonja Sardoč (1923 – 2015)



Lani 26. decembra je v Kopru umrla naša dolgoletna članica Sonja Sardoč. Po poklicu je bila učiteljica in dolga leta tudi ravnateljica ŝole v Kopru. Njena družina izhaja iz Primorske in se je po umiku pred faŝistichim nasiljem po prvi svetovni vojni ustalila v Ŝentilju pri Mariboru, kjer je Sonja tudi pokopana.

Z esperantom se je sreĉala leta 1956 in od takrat ostala v naŝem gibanju. Bila je tudi soustanoviteljica Esperantskega društva Koper, pozneje tudi njegova predsednica; bila je ĉlanica Predsedstva ZES in organizatorka vrste domaĉih ter mednarodnih prireditev. Sonja je bila zelo aktivna tudi v Druŝtvu izgnancev Obale ter v Združenju zveze borcev Koper.

Vsi, ki smo z njo sodelovali, se je bomo spominjali kot tople, iskrene in prizadevne prijateljice ter sodelavke.

Ni se toliko posveĉala jeziku kot pa samoumevni povezanosti esperanta z naprednima in svobodoljubnima prizadevanja v domaĉem in mednarodnem sodelovonju. Ĉlani Zdruĝenja za esperanto Slovenije jo bomo zato ohranili v hvaleĝnem spominu. **J.Z.**

## La 101a UK de Esperanto en Nitra



La ĉi-jara Universala Kongreso de Esperanto, la plej grava okazaĵo de la esperantista jaro, okazos en la urbo Nitra en Slovakujo. Ĉu vi demandas kial veni al Slovakujo por la 101a UK? La Universala Kongreso en Slovakujo havos kelkajn specialaĵojn:

- Historie unua UK en Slovakujo.
- Ekologia kongreso (Eŭrope atingeblas trajne, buse, aŭte, ene de la urbo oni ne bezonos urban trafikon, ĉio kongresrilata estas ene de pieda distanco de 1 km).
- Ekonomia kongreso (la tranoktado-prezroj ekas jam ĉe 7 EUR/nokto, tagmanĝkostoj en restoracio: 3,50 EUR, biero: 1 EUR).
- Videbla kongreso (Nitra estas relative malgranda urbo, danke al kio Esperanto kaj la kongreso estos tre bone videblaj).
- Gastamo kaj gastronomio.
- Eblo malkovri Slovakujon (landon meze de Eŭropo, kun tre riĉa historio).
- Nova jarcento de kongresoj (modernigo, novigo de la plej granda Esperanto-kongreso).
- Riĉega junulara programo (Nepre indos ĝin partopreni).
- Riĉa kultura kaj faka programo.

Ĉi-jara kongresa celo estas agi ekstermovade kaj malfermi nian movadon al la mondo. La 101a UK okazos en la tempo, kiam Slovakujo prezidos la Konsilion de EU (julio – decembro 2016). Dum la 101a UK la 23–30an de julio 2016 okazos kvar malfermitaj fakaj aranĝoj:

1. Lingvo-politika konferenco de Viŝegradaj landoj V4+ “Perspektivoj de lingva komunikado en EU”.
2. Internacia entreprenista kaj komerca forumo “Investi en koro de Eŭropo – investi en Slovakujo”.
3. “Inter-religia renkontiĝo” de reprezentantoj de diversaj religioj.
4. La 20a Internacia Medicina Esperanta Kongreso.

Se vi ne trovis en la listo “la vian” kialon, volonte informu nin pri tio: [kk@esperanto.sk](mailto:kk@esperanto.sk). Kaj se vi jam venos al UK pro iu ajn kialo, dankon anticipu: ĝis revido somere en Nitro!

Pliaj detaloj pri la 101a UK troviĝas ĉi tie:

<http://www.nitra2016.sk/>

<https://www.facebook.com/uk2016>

<http://www.uea.org/kongresoj>

Zuzana Kozuchova, LKK-anino pri publikaj rilatoj

## 3a Konkurso pri pentrado Angelo Soranzo

Estimataj geesperantistoj, vi ricevu la regularon (<http://www.tea1906.altervista.org/informoj-en-esperanto.html>) kaj la aliĝilon al nia konkurso por la nuna jaro, kies temo estas PACO.

Ni varme petas vin diskonigi ĝin en via medio: ne necesas esti esperantisto por partopreni! Ankaŭ tiu ĉi estas bona ilo por informi pri esperanto. Precipe adresu vin al lernejoj pri grafik-arto, pri pentrado, kaj simile. Ni petas atentan legadon de la regularo, estas kelkaj kondiĉoj en ĝi ne preteratentindaj.


En la unua konkurso ricevis premion geknaboj el Slovenujo, en la dua el Serbujo, kaj en tiu ĉi tria ni esperas premii denove viajn artistojn.

Ni dankas jam nun por via aktiva kunlaborado, sed ankaŭ pri via agado en la diskonigo de la konkurso.

Edvige Ackermann, Triesta Esperanto-Asocio.

Za ta razpis, ki je objavljen na spletišču TEA (<http://www.tea1906.altervista.org/index.html>) v esperantu in italianŝĉini, je Anton Miheliĉ pripravil prevod pravilnika in prijavnice v slovenŝĉino. Dosegljiv je s povezavo <http://www.antonmihelic.com/> in klikom na ustreznj dokument v esperantu ali slovenŝĉini. **O.K.**

## Ekparolu!



Ni informas vin ke en la jaro 2016 edukado.net komencos grandan, novan projekton, kiun ni nomis EKPAROLU!

### Celo de la projekto:

- Doni eblon al la ĵuslernintoj de Esperanto parole apliki la lingvon, ensociiĝi kaj informi ilin pri la programoj, kursoj kaj pluaj ebloj de studoj
- Vaste eluzi la liberajn fortojn de la movadanoj partopreni en la plua edukado de komencintoj
- Fortigi la lokajn klubojn kaj la movadon

### Baza ideo

Ene de edukado.net ni kreos surfacon, kie la du flankoj, nome NEVOJ – (komencintoj) kaj ONKLOJ (speciale



trejnitaj esperantistoj) trovas unu la aliajn kaj helpe de skajpa kontaktiĝo pasigas kune parolsesiojn. (Kompreneble sub la nomo ONKLOJ kaj NEVOJ ni komprenas ankaŭ onklojn kaj nevojajn.)

Ni nombros la sesiojn ambaŭflanke.

**La NEVOJ** devus anonci sian intencon uzi la servon. Ni akceptos tiujn, kiuj estas je A2-nivelo, aŭ finis la arbon de DUOLINGO, konas la bazon de la gramatiko kaj konas minimume 300 vortojn. Enirinte la programon ili ricevos rajton je 20 (aŭ 30) sesioj de 20 minutoj (decidota) por ekzerci sin en la parolata lingvo.

Ili povos elekti kion ili volas ekzerci: prononcadon, paroladon laŭ difinitaj temoj, aŭ liberan konversacion, ekzerci sin pri konkretaj gramatikaĵoj aŭ korektigi kelkfoje skribaĵojn.

**La ONKLOJ** estos spertaj esperantistoj, sed ne nepre instruistoj. Ilia tasko estos la paroligo de komencintoj. La onkloj havu minimume B2-nivelon (prefere kun KER-atestilo). Ili ricevos formadon pri uzo de retroprogramoj, ekzemple skajpo.

Edukado.net disponigas mallongan manlibron pri la strukturo kaj ĉefaj reguloj de sukcesa paroliga sesio kaj por ĉiu temo, kiun la nevoj povos elekti ni donos unupaĝan resumon, helpon al la onklo.

La onkloj faros sian agadon senpage, sed la plej aktivaj ricevos premiojn.

Kiam NEVO eniras la reton, li tuj povas lanĉi serĉadon pri paroligeblo, laŭ temo, tempo aŭ serĉi konkretan onklon, aŭ alian laŭ la nacia lingvo, en kiu li volas esti helpata.

#### **Kion ni esperas, kion eblus atingi?**

La programo ebligus al ordinara esperantistoj, ankaŭ por nevojaĝemaj aŭ malhelpataj finance aŭ fizike en movoj, ke ili partoprenu en la movado, sentu sin utilaj. Ni havas multajn neuzitajn fortojn, kiujn ni povas tiel aktivigi.

#### **Kio farendas nun?**

- La multe pli detala priskribo de la projekto jam ekzistas.
- La estraro de la Fondaĵo edukado.net aprobis ĝin,

subtenas, kaj komenciĝis traktado kun la programistoj.

- Ni serĉas bonan logotipon kaj trafajn grafikaĵojn por la diversaj partoj de la koncerna programo. (Alvoko disiros baldaŭ).
- Necesas trovi ankaŭ financajn subtenantojn.
- Sed la plej grava afero estas nun, ke paralele kun la programista laboro **ni jam enketu pri tio, kiuj pretos esti la unuaj onkloj kaj onklojn**, kiuj pretos kunpensadi, perfektigi kaj poste testi la programon, kaj eventuale helpi en la plua formado de aliaj onkloj. Interesiĝantoj kontaktu Katalin Kovats, kiu kreos por la geonkloj apartan forumon kaj gvidas ilin en la unuaj paŝoj.

Zgornja najava projekta s pozivom k sodelovanju je v celoti prenesena s spletišča *edukado.net*. S tem želimo pomagati pri propagiranjū projekta. Enako besedilo, prevedeno v slovenščino, si lahko ogledate na spletišču *esperanto-maribor.si* med novicami pod naslovom *Spregovori! | Ekparolu!*.

### **Ĉlanarine ZES in EDL**

Letna ĉlanarina ZES za individualne ĉlane je 12 € za zaposlene, 6 € za ŝtudente, upokojence in brezposelne ter 0 € za mlade do 18. leta. Ĉlanarino ali prostovoljne prispevke lahko plaĉate na sreĉanjih in sestankih ali na poslovni raĉun ZES pri Delavski hranilnici d.d. Ljubljana ŝt. SI56-6100-0001-2538-761 z obrazcem UPN. Kot kodo namena vpiŝete »char« in namen plaĉila: »priimek, ĉlanarina in ustrezno leto oz. obdobje«. Pri referenci vpiŝete kodo SI99, ostalo pa pustite prazno.

Letna ĉlanarina ED Ljubljana znaŝa po novem 12 € za zaposlene, 6 € pa za brezposelne, upokojence in ŝtudente. Ĉlanarino ali prostovoljne prispevke lahko plaĉate na sreĉanjih in sestankih ali na poslovni raĉun EDL pri Delavski hranilnici d.d. Ljubljana ŝt. SI56-6100-0000-1703-764. Glejte ŝe navodilo za izpolnitev obrazca v zgornjem odstavku. **O.K.**

**INFORMACIJE / INFORMOJ** izdaja / eldonas Zdrufenje za esperanto Slovenije / Slovenia Esperanto-Ligo, Ŝtefanova 9, SI-1000 Ljubljana, Slovenija / Slovenujo. <http://www.esperanto.si>. Matična ŝt. / kodnumero 1205226. ID za DDV / n-ro por AVI: 93737777. Poslovni raĉun / bankkonto: IBAN SI56 6100 0001 2538 761 pri / ĉe Delavska hranilnica d.d.. (Swift-kodo: HDELSI22). Uredil / redaktis Ostoĵ Kristan, lektoriral / kontrollegis Tomaĵ Longyka.

**ISSN 2385-992X** Naklada / eldonkvanto: 60

**ISSN 2385-9628** URL: <http://www.esperanto.si/eo/bulteno-informacije-informoj-0>